



Kulturaj Kajeroj

É. MANÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto-fondinto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, EPINEUX-LE-SEGUIN (Mayenne) Tél. 1 - Francujo

JARABONO :

Sendotaj al : Micard Henri
« Kulturaj Kajeroj »
Epineux-le-Séguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62

Simpla : 7 fkoj /
Bonfara : 12 fkoj /

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

JANUARO - FEBRUARO

1966

1

KULTURAJ KAJEROJ

1966

Januaro - Februaro

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thebaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna repesaĵo.

ENHAVO

Pri la Kulturdomo

Esperanto tra la mondo

A. Frangeul

El Bretonio

La mistero de Sankta Cornely

El prelego

Evoluo de la skribo

G. Roux

El Kanado

Pri la tempo de la acera siropo

J. Berthelot

El la naskiĝurbo de Champlain

Brouage

Gravaj datrevenoj

Rakonto

Hundo de blindulo

P. Arène
(trad. P. Sarpy)

Por via distro

Nia konkurso

P. Chevalier

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzajojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

PRI LA KULTURDOMO

Kelkaj precizigoj

Jam alvenas al ni informpetoj pri nia 1966a programo. Eĉ kelkaj ĉambroj estas rezervitaj por Pasko kaj la somero. Sed ĝis nun ni povis informi nur pri la ĝenerala kadro de la programo. Ni povas nun doni kelkajn pliajn precizigojn.

La programo de la prelegoj dum la Paska Kultura Semajno anonciĝas tre interesa. La ĝe-junuloj francaj kaj alilandaj, kaj kompreneble la pli aĝaj gesamideanoj, certe interesiĝos pri la temoj de tiuj prelegoj : « Ortografio kaj fonetiko en Esperanto » — « Kial iu Dolmeno en Baugé ? » — « Car vort' estas Vorto » — « Edukado kaj toleremo » ktp. Ankaŭ okazos la kutimaj kursoj, konversacioj, ludoj, ekskurso. Kaj oni promesis al ni la partoprenon de... milda vetero !

La unua somera periodo estos, kiel anoncote, gvidata de Sro Ribot kiu instruos la superan kurson ; Fino Vazon gvidos la porkomercantan kaj la duagrada praktika kurso estos gvidata de Sino Major el Londono.

La dua periodo, Internaciaj Kulturaj kaj Turismaj Ferioj, prezentos la ĉiam plaĉajn diversajn aktivajojn. Unue, la prelegoj. Dro Bormann el Germanujo, doktoro de politikaj sciencoj, Ins-
trukomisiito por Esperanto en la Universitato de


Hamburg, parolos pri la helpaj kaj malhelpaj faktoroj de la Eŭropa Komunumo kaj ankaŭ pri aliaj problemoj aktualaj. Aliajn temojn prezentos elstaraj samideanoj.

Dum la tria periodo oni povos sin prepari (aŭ finprepari) por la Atesto pri Lernado, la Atesto pri Supera Lernado, la Atesto pri Kapableco kaj ankaŭ, la unuan fojon, la Pedagogia Atesto. Kiel kutime la alilandanoj havos la eblecon provi la Internacian Ateston pri Kapableco.

Prof. Martin el Rennes gvidos la Studperiodon organizitan de UFE (28 aŭg.-11 sept.). Kiuj jam havis la okazon sekvi tiajn kursojn, tiuj scias kiom agrabla estas la instruo de Prof. Martin. Ankaŭ dum tiu periodo okazos komuna vizito de Anĵuo kaj Tureno.

Ni esperas ke ni baldaŭ povos sendi al ĉiuj interesatoj ankoraŭ pli precizajn informojn pri tiu programo. Ĉar ni daŭre klopodas por aldoni novajn nomojn al la listo de la prelegontoj kaj de la kursgvidontoj, kaj eĉ novajn artiklojn al la listo de la aktivajoj.

Sed ni petas, bonvolu aliĝi sufiĉe frue por ke ni rezervu por vi taŭgajn ĉambrojn.



Se vi deziras ricevi la venontan numeron de
KULTURAJ KAJEROJ

ĝustatempe

Tuj reabonu !

Abonigu viajn amikojn !

(Listo de perantoj sur la lasta kovrilo-paĝo).

Esperanto tra la Mondo



Subskribo-kolektado. — La kolektado de subskriboj por la peticio al UN daŭros ĝis la 31-a de Julio. Ĝis la 3-a de Decembro estis jam ricevitaj pli ol 500.000 individuaj subskriboj kaj la aprobo de 2.771 organizaĵoj diverspecaj, kies membraro atingas preskaŭ 48 milionojn.

Renkontiĝoj en 1966. — Samtempe kun la Kongreso en Budapeŝto, okazos apud tiu urbo antaŭkampado de la Mondkongreso de Internacia Federacio de Kampado. Esperanto-tendaro povus esti instalita. Skribu al : S-ro Lavallée, 63, av. Carnot, Bordeaux-Caudéran, Francio.

— Kongreso de la katolikaj esperantistoj okazos en Sankt Gallen (Svisio), 21 - 27-an de Julio.

— Eŭropa Ferio-semajno en Goldern (Svisio), apud la lago de Zŭrich (4-11 septembro). Adreso : S-ro H. Hunkeler, Pf. 417, CH-5001, Aarau.

— Jubilea 50-a Brita Kongreso de Esperanto, en Norwich, 27-30 de majo. Adreso : S-ino E. ; Watson, 5 Rolleston Close, Norwich, Norfolk, Britujo.

— Aŭstria Esperanto-Federacio kaj « Heroldo » aranĝos ferian restadon en la urbeto Klosterneuburg, apud Vieno, 26-30 de julio.

— Internacia Pedagoga Esperanto-Seminaro, 10-12-8 en Hungario. Adreso : Pedagoga Grupo de H.E.A., Aprilis 4 ut. 1, Szeged.

— Nacia Esperanto Kongreso, en Agen (Francio) dum Pentekosto (28-30 de majo).

— Ĉe Bonat (Creuse) Francio, okazos de la 17-a ĝis la 22-a de aŭgusto intensa Esp.-Kurso. Poste, konstrulaboro, amuziĝo, kunrestado, ĝis la 2-a de Septembro. Junaj esperantistoj helpu ! Rilatu kun : J.-P. Boulet, Grande-Rue, 18 - Chateameillant, Francio.

— Dua Internacia Esperanto-Seminaro por sciencistaj studentoj, en Torun (Pollando) 14-16 de Aprilo. Adresoj : F. Simonnet, 16, rue Dohis, 94 - Vincennes, aŭ : Studenta Scienca Rondo, str. Moniuszki 16/20, Torun, Pollando.

52-a Universala Kongreso. — La estraro de U.E.A. voĉdonis favore al okazigo de tiu kongre-

so en Tel Aviv (Israelo) en 1967. U.E.A. aranĝos aviadilan karavanon.

Novaj el Ĉinio. — La revuo « El Popola Ĉinio » anoncas, ke la Centra Farejo de Novaj el Ĉinio kaj Dokumentaj Filmoj ĵus produktis, en kunlaboro kun Ĉina Esperanto-Ligo, kolorfilmon en Esperanto kun la titolo « Brila Festotago ». La prezentado daŭras ĉirkaŭ unu horon.

...el Brazilo. — Okazis en oktobro la 19-a brazila Esp.-Kongreso. Partoprenis eminentuloj, i.a. la prezidanto de la brazila Akademio de Filologio kaj la rektoroj de la Universitatoj de Brazilo kaj de Guanabara.

...el Ĉeĥoslovakio. — En Slovakio revigliĝas la movado. Fondiĝis multaj novaj rondetoj. Aperis nova lernolibro. La Bratislava Televido raportis pri renkontoj kaj programoj. La klubo de Brno havas proksimume 400 membrojn.

Eldonaĵoj. — En la fama serio « Oriento-Ocidento », U.E.A. ĵus eldonis « Reĝo Lear », de Shakespeare, en traduko de Kalocsay.

— Ĵus aperis « Katalogo de elektitaj libroj en Esperanto », eldonita de U.E.A.

— Pensu pri « Planteto », trimonata gazeto por infanoj. Adreso : Niko Tumi, Pispalanharju 13, Pispala, Finnlando. Petu provkzempleron.

— Vi povas prunricevi 72 diapozitivon kaj sonbendon kun teksto kaj dalmatia muziko. Sendu 2 respondkuponojn al : S-ro Hugo Kraus, Brigittenauer Lande 150/5/3/12, Wien, XX/20 Aŭstrio.

Turistoj. — Se vi vizitos Francion, ni rekomendas al vi :


— « Gvidlibro tra Parizo », de Esperantaj Francaj Eldonoj.

— Gvidlibretojn : « De Parizo al Lazura Marbordo », « De Parizo al Pirenea montaro », « De Parizo al Loire-kasteloj kaj Atlantikaj strandoj » de S-ro Retot. Haveblaj ĉe nia Libro-Servo.

— Petu de Syndicat d'Initiative, 03 - Vichy, Francio, la belan, multkoloran, esperantlingvan informilon pri tiu turisma kuraĉloko.

EL BRETONIO

La mistero de Sankta Cornely



« Sankta Cornely estis papo en Romo. Paganaj soldatoj deziris lin kapti, sed li sukcesis sin forŝovi kun du bovoj, kiuj portis fiajn aferojn. Iun vesperon li alvenis ĉe la tumulto Sankta Mikaelo kaj konstatis, ke li ne plu povas esperi: antaŭ li kuŝis la maro, kaj post li venis la paganaj soldatoj. Tiam venis al li la ideo sin

kaŝi en la oreilon de unu el la bovoj. Kaj tuj la soldatoj ŝtonigis. Poste Sankta Cornely faris multajn miraklojn: aveno maturiĝis tuj post semado, kaj li protektis la bovojn. Kiam li mortis oni lin enterigis en la monteto Sankta Mikaelo, kie oni konstruis kapelon. De tiu tempo oni ĉiujare sole nas la « Pardon » de Sankta Cornely.

Tiun rakonton vi aŭdas de unu el la infanoj, kiuj atendas la turistojn ĉe la linioj de menhiroj de Menee en Carnac (Bretonio). Ĉu tiu rakonto temas pri la vivo de iu Cornely? Oni povas dubi pri tio ĉar ŝajnas, ke la papo Cornelius (251-253) neniel rilatas al Sankta Cornely. Sed restas la fakto, ke Cornely estas sankta estulo, kies kulto rilatas al la bonstato de la bovoj kaj al la sezona ciklo de greno.

Tiu lasta punkto devigas nin aludi pri la orientiĝo de la menhir-linioj. Oni fakte konstatis, ke la linioj de Kermario orientiĝas al la loko, kie la suno levigas je la somera solstico (azimuto 54° la 21an de junio). La menhiroj de Kerlescan preskaŭ perfekte sekvas la ekvinoksan linion. La mezaj someraj sunleviĝoj (8an de majo kaj 8an de aŭgusto) estas montritaj de la menhir-linioj de Menee, kaj la vintraj mezaj sunleviĝoj (8an de novembro kaj 4an de januaro) de la menhir-linioj de Sainte Barbe kaj Saint-Pierre-Quiberon. Ĉiu el tiuj orientiĝoj korespondas al natura fe-

nomeno: la ekvinoksoj al la plej altaj tajdoj, la somera solstico al la plej mallonga nokto kaj la vintra solstico al la plej longa. La mezaj sunleviĝoj korespondas al semado, ĝermado, florado kaj rikolto. Pro tio specialisto de bretonia prahistorio diris, ke la menhir-linioj estis religiaj monumentoj, kien kunvenis la homoj okaze de religiaj ceremonioj je la dato montrita de la orientiĝo de la ŝtonoj.

Ni revenu al Sankta Cornely. Oni lin gloras je la aŭtuna ekvinokso. Ĉu tiu legenda sanktulo fakte estus dio de la megalita mitologio? La kapeloj al li dediĉitaj staras apud la menhir-linioj de Carnac, Ladeven, Plouhinec kaj Languidic. Ĉar kristanismo ĝenerale adoptis, iom transformitajn, la antaŭajn mitojn, oni povas pensi, ke ekzistas ligilo inter Sankta Cornely kaj la kulto ekzistanta, kiam tie establiĝis kristanismo. Nenio vere pravas, ke tiam pluekstis iu megalita kulto, sed alia konstato povas montri, ke eĉ nuntempe, en la XXa jarcento, oni ankoraŭ kredas je la megalitaj dioj. Kelkaj menhiroj tute sendube havas la formon de penisoj, kaj la tradicio instigas la senidajn virinojn froti sian ventron kontraŭ tiuj ŝtonoj kiam ili deziras infanon.

Ĉu fakte Sankta Cornely ekzistis? La legendo rakontas ke oni enterigis lin en la tumulto Sankta Mikaelo. Kiam, antaŭ cent jaroj oni fosis tiun monumenton, vertikala galerio kondukis al dolmen (do, tombo). Aliaj galerioj ebligis atingi centran ĉambron, kie oni trovis dudekon da ŝtonkofroj. Krom la kutimaj postrestaĵoj oni trovis ostarojn de viro kaj de pluraj bovoj. Poste, kiam oni traktis ĝin per karbono 14 oni konstatis, ke kelkaj el la postrestaĵoj estas 5000 jaraĵ kaj kelkaj aliaj 9000 jaraĵ. Ĉu oni povas konkludi, ke Sankta Cornely estis fakte prahistoria homo respektigata de siaj samtempuloj?


Kia ajn estas la opinio de la dudek-jarcenta homo pri sankta Cornely kaj pri la signifo de la menhiroj, restas demando senresponda. Kiamaniere la tiamaj homoj starigis tiujn ŝtonegojn? Kelkaj estas pli ol tricent mil kilogramojn pezaj. Tiu de Locmariaquer, kiu kuŝas frakasita en tri partojn estas 21 metrojn alta. Kiamaniere oni

alportis ilin surloken ? Plejofte tiaj rokoj ekzistas nur plurajn kilometrojn for. Eĉ en Anglujo, la ŝtonegoj kiujn la prahistoriaj homoj utiligis por konstrui tiun cirklan monumenton de Stonehenge, venis, parte de loko kvardek kilometrojn malproksima, kaj parte de loko kvarcent kilometrojn mal-

proksima, trans markolo ; kaj ili pezas de kvar ĝis kvardek tunoj.

Ni, kiuj fieras pri niaj gigantaj konstruaĵoj, ĉu ni ni estas devigataj miri pri la megalitaj « konstruantoj » ?

(Kompilita el diversaj revuoj),



**MANKOS IO EN VIA
ESPERANTISTA VIVO SE VI NE
VIZITIS LA ESPERANTISTAN KULTURDOMON.**

**PETU INFORMOJN -- FRUE ALIĜU.
E.K.D. Grésillon, 49-Baugé**

El prelego prezentita en Gresillon

Evoluo de la skribo

De la unuaj skribaj signoj al nia skribmaniero kaj plej modernaj registradoj estis longa peniga vojo.

— La signoj malkovritaj en grotoj al kiuj oni atribuis religian aŭ ritan valoron, estis, eble, nur esprimo de kreema plezuro de stilizitaj bildoj sed eble, ankaŭ estis rimeno por teni memoron de okazaĵo; rimeno de fundamenta esprimo de la homo per kiuj efektiviĝas la projekcio de lia kompreno de la mondo, la aperigo de lia krea kapablo.

— Kiu estas la senco de la arbitraj signoj de la zonoj de la indianoj Iroquois faritaj per linioj de konkajtoj aŭ perloj?

— Multe oni parolis pri la surskriboj memorhelpaj de la Pask-insulo, similaj al figuroj de fadenludoj, kiuj subparolas psalmokantadon por rememori genealogiojn aŭ sanktajn himnojn; surskriboj, kiuj unuavide similis al signoj de urboj apud la riverego Indus aŭ de Cejlono.

— Eĉ la manuskriptoj de la kopiistojmonaĥoj ludas kiel kolektiva memoro por iniciatoj.

Skribo estas nur 6.000 jara.

Unue estis rakontoj per bildoj. La mallongigita skribo de la antikva Egiptujo, tiuj de Sankta Jeromo kaj Sankta Aŭgusteno taŭgis nur por pastroj kaj adeptoj.

Oni kredis skribon de dia deveno, kaj oni atribuas al Moseo la hebrean skribon.

Je la XVIIIa jarcento antaŭ Kristo, oni elpensis alfabetojn multformajn ĉe tre nombraj landoj.

La greka kaj ĉina lingvoj estas la plej malnovaj; oni konas ilian evoluon de 1400 antaŭ Kristo ĝis nun t.e. 3350 jaroj proksimume kaj same evoluon de la skribo.


La skribmaniero de la plej malnovaj grekaj dokumentoj havas nenion komunan kun la alfabeto pruntita al Fenico je 750 a. Kristo. Estis fonetika skribo sed sufiĉe ne preciza. La unuaj dokumentoj estas kalkuloj sur argilaj tabuloj malkovritaj en 1886 en Kreto kaj en 1939 en Pylos (suda Grekujo). En 1952, oni malkovris la inventaron de poetoj en reĝaj kuirejoj (1400a. Kristo).

La deĉifrado estis malfacila pro la evoluo de la lingvo; sed finfine oni kapablis traduki tre antikvajn tekstojn.

De tiu alfabeto devenas la cirila alfabeto uzata de rusoj kaj slavoĵoj kaj la latina alfabeto uzata en okcidenta Eŭropo, grandparte en Afriko kaj Azio. Oni celebris la XIan jarcenton (863) de la cirila alfabeto antaŭ 2 jaroj (1963). Konstanteno-Cirilo kaj Metodo estis fratoj el Tesaloniko, kiuj venis al Moravio por prediki evangelion per la lingvo de tiu lando. Cirilo elpensis literojn por skribi la slavan lingvon. Kiam ili mortis, iliaj disĉiploj forkuris Bulgarion, Makedonion.

Fine de la Xa jarcento, la kleraj Bulgaroj helenigis tiujn literojn, kiuj larĝe disvastiĝis en Serbion, Bosnion, Rusion en 998 kaj Rumanion ĝis la XIXa jarcento.

La malnova ĉina skribo estis ideografia (nenia indiko de prononco). La unuaj doku-



Pri la tempo de la Acera Siropo en Kanado

Legendoj diras, ke la Indianoj, la unuaj enloĝantoj en Kanado, jam malkovris la eblecon elfari bonegan sukeraĵon el la suko de la acero.

La Francoj kiuj venis poste, certe kun la arto de kuirmaniero en la sango, tre rapide alku-timiĝis eltiri sukon el la aceroj ĉiun printempon por akiri la sukeran sukon, kiu fariĝas aromple-na siropo, kiam ĝi estas preparita.

Estas sufiĉe malfacila laboro elfluigi la su-kon el la arboj. Unue la farmisto devas kunpreni multe da tuboj, gutujsimilaj kaj purajn sitelojn el aluminio. Kaj li iras de arbo el arbo por fari tranĉvundon en la ŝelo de ĉiu. Li metas tubon en ĉiun truon kaj per la anso hokas sitelon sub la specialaj tuboj. Kiam la suko komencas elflui el la arbo, ĝi kuras laŭlonge de la tuboj, kaj falas en la sitelojn guto post guto.

Sur kelkajn tre dikajn arbojn, oni povas hoki ĝis kvar sitelojn sed sur la plej maldikajn nur unu.

En tiu lando estas tre kutima spektaklo dum Marto vidi tiajn arbojn kun hokitaj sitejoj.


Kiam la siropo estas farita (daŭras longan tempon, multaj horoj da boilado necesas por havi

tian rezulton), kaj antaŭ ol meti ĝin en ujojn, la farmfamilio festas la ĝojan okazaĵon kaj invi-tas geamikojn kaj gekonatulojn veni en la kaba-non. La dommastrino kuiras fazeolojn kaj metas ilin en korbon kun freŝaj bulkoj, teleroj, forkoj, tranĉiloj, kuleroj, varma kafo kaj lakto. Kaj ŝi jungas la ĉevalon al glitveturilo ; poste kun laŭ-taj ĝojkrioj, la infanoj surgrimpas ĝin kaj kovras sin per lantukoj ; la grandegan piknikko-bon ili mem tenas, kaj la dommastrino supreniras. Kaj ili foriras tre rapide al la kabano kie la gastoj jam atendas aŭ alvenos post momento. Por ko-menci, ili manĝas la fazeolojn kaj poste estas la solena momento, kiam la unua sukera, sukkena siropo estas verŝata en la grandan terpoton por la geamikoj. Ĉiu gasto tenas bulkon kaj tasegon da varma siropo, kaj iras al la kabano en la sunlumon por fari « la tire ».

« La tire », kiu estas bonega dolĉaĵo ĉe la Kanadanoj estas farita tiamaniere : ili verŝas la varman siropon sur la malvarman neĝon. Kiam ĝi fluas, la siropo malmoliĝas kaj farigas mirinda sukeraĵo. Oni manĝas ĝin kun varma bulko kaj butero kaj kia granda festo estas !

En la arbaro resonas la ridoj kaj laŭtaj paro-loj, kiam la familio kaj amikoj gustumas. Ĉiuj estas gajaj, precipe la farmisto, kiu gustumas sian siropon kaj kiun ĉiuj komplimentas pri lia laboro.

Joselyne BERTHELOT.



VIZITU PARIZON

ALIGANTE AL LA INTERNACIAJ KUL-TURAJ kaj TURISMAJ FERIOJ vi povos ankaŭ viziti la francan ĉefurbon.

Petu informojn :

E.K.D. Grésillon, 49-Baugé

Naskigloko de Samuel de Champlain fondinto de Quebec

Meze de la Atlantika marbordo, inter la riveroj Seudre kaj Charente ĉarma vilaĝo kuŝas Ĉirkaŭita de fortikaj muroj. Jam de malproksime oni ĝin vidas starantan super la marĉoj. Vojetoj serpentumas al ĝi transpasante kanalajn kanaletojn. La bruoj ne kuraĝas tro laŭtiĝi kaj nur aŭdiĝas la krioj de la akvaj birdoj.

Eĉ dum la Mezepoko Brouage ludis gravan komercan rolon. Bone ŝirmita ĉe la plej interna parto de la tiama plej bela franca haveno, tiu vilaĝo estis « la ĉefurbo de salo » kolektita en 8000 hektaraj salmarĉoj kaj senditaj al Flandrio kaj Germanio. Tie, en 1567 naskiĝis de protestanta familio, Samuel de Champlain, kiu, kvardek unu jarojn poste fondis Québec kaj estis guberniestro de franca Kanado ĝis sia morto en 1635.

En 1638, la protestantoj en la Rochelle rezistis Richelieu kaj Brouage, nur 40 km de la fortika urbo, fariĝis la armeilo de la reĝa armeo. Oni rekonstruis la remparojn kaj post dek jaroj Brouage entenis 6000 homan garnizonon ; ĝi estis la plej fortika loko sur la tuta atlantika marbordo.

Tiel forta ĝi estis, ke dum la ribelo de la nobeluloj, la Frondo, Du Dognon, guberniestro de la urbo sin deklaris suvereno de Brouage. Mazarin, la tiama ĉefministro, donacis 100.000 eskudojn al la ribelulo kaj mem fariĝis guberniestro de la urbo.

Sed fine de la 17a jarcento Brouage malgraviĝis. La fondo de nova arsenalo kaj haveno en Rochefort deprenis parton de ĝia milita rolo. La haveno de Brouage iom post iom ŝlimiĝis kaj la salmarĉoj fariĝis nesalubraj marĉoj.

Loĝis tie nur malgranda garnizono, kiam, dum la Revolucio, oni tie enkarcerigis neobeantajn pastrojn.

En 1659, Ludoviko la dekkvara kaj Marie Mancini, nevino de la ĉefministro Mazarin, amis unu la alian. Ili estis 20 jaraĵ kaj deziris geedziĝi. Sed Mazarin deziris konfirmi la pacon inter Fran-

BROUAGE

cio kaj Hispanio per geedziĝo de Ludoviko kaj Maria Teresa, filino de la hispana reĝo. Marie Mancini estis ekzilita en La Rochelle, kaj poste iris al Brouage por kaŝi sian ĉagrenon. Dum kvar monatoj ŝi tie suferis, melankolie promenante sur la remparoj, rigardante la maron, legante Senekon kaj Filostraton. Oni diras ke, kiam Ludoviko sendis al ŝi hundidon, filon de « Friponne », hundino plej ŝatata de li, ŝi eĉ ne respondis la leteron alportitan kun la hundido. Tiam Mazarin permesis al ŝi reveni al Parizo. Ses monatojn poste Ludoviko kaj Maria Teresa geedziĝis en Saint-Jean-de-Luz apud la franca-hispana landlimo. Revenante, Ludoviko forŝoviĝis kaj iris al Brouage, kie li loĝis en la ĉambro antaŭe okupita de Marie Mancini kaj promenis sur la remparoj.

Se vi vizitos Brouage, vi povos admiri la plej belan ekzemplon de la milita arto antaŭ Vauban. La muroj estas 13 metrojn altaj kaj traboritaj de du grandaj pordoj. La korbelturoj estas gracie delikataj. La pli granda nombro el la tiamaĵ domoj malaperis. Sed oni ankoraŭ povas vidi la Doman de la Guberniestro (kie loĝis Marie Mancini kaj Ludoviko la 14a), la kazinojn, la forĝejojn, la armeilejojn, la provizejojn. Konstruita komence de la 17a jarcento la preĝejo, senornama kaj severaspekta, estis riparita dank'al la financa helpo de la urbo Québec.

Sed, karaj legantoj, vizitante Brouage, ne forgesu la malfeliĉan Marie !



*Kaŝobservejo
sur la remparoj*

GRAVAJ



DATREVENOJ

Antaŭ 80 jaroj naskiĝis en Pochlarn (Danubo) :

OSCAR KOKOŜCHKA. — Tiu pentristo, grafisto, teatro-dekoraciisto, estas konsiderata, kiel unu el la « ĉefoj » de impresionismo. Liaj dramoj, liaj portretoj kaj pejzaĝoj, liaj dekoroj pravas lian multaspektan talenton.



Antaŭ 175 jaroj naskiĝis en Vieno :

FRANZ GRILLPARZER. — La aŭstra poeto komence studis juron, fariĝis ŝtatoficisto, poste direktoro de la financaj administraj arkivoj kaj fine kortega konsilanto. Jam dum sia junaĝo li renkontis sukceson kun siaj teatraĵoj « Safo » kaj « La avino ». « Pri maro kaj karaj ondoj » estas la plej perfekta poezia tragedio. La verkoj de Grillparzer asocias la aŭstran barokon kun romantikaj kaj klasikaj elementoj.



Antaŭ 475 jaroj mortis en Breisach :

MARTIN SCHONGAUER. — Pentristo kaj gravuristo de la malfrua periodo gotika, filo de orajisto, li estis instruata en Bruselo. Liaj laboraĵoj multe influis la tiaman arton kaj Dürer inspiriĝis per ili por siaj kupro-gravuraĵoj.

HUNDO DE BLINDULO

— « *Sinjoro ! Ho ! Sinjoro !...* »

Mi returnis min al tiu voko ĵetita per ŝanceliĝanta voĉo kaj mi ekvidis, starantan meze de l'herbo, maljunan viron, kiu batis l'aeron per bastono.

— « *Min senkulpigu, sinjoro, — daŭrigis la maljunulo, — sed mi estas blinda, kaj de pli ol unu horo, kiam mi estas tie ĉi, vi estas la unuan, kies paŝojn sur la ŝtonoj mi aŭdis.* »

El la kvin aŭ ses stratetoj aŭ bulvaroj, kiuj, aranĝite en la malnovaj fosaĵoj, formas verdantan zonon al ruiniĝantaj remparoj. la bulvaroj de l'arenoj kun sia triobla vico de ĝibaj ulmoj, de kiuj somere pluvigas grandegaj raŭpoj, kun siaj aleoj kovritaj per densa herbo, tra kiu la kutimo de maloftaj paŝantoj markis iom post iom reton de oblikvaj vojetoj — estas certe la plej dezerta.

Krom tio, la apudeco de l'tombejo allinianta tie siajn cipresojn kun malnova ruĝa dometo eksloĝejo de l'ekzekutisto, allasis al tiu kvartalo malkvietigan famon. La promenantoj evitas ĝin, preferante cetera la korektan avenuon, tute novan, kiu kondukas de la ponto al la stacio ; mi do ne miris, ke la malfeliĉa blindulo, tie erarinte, longe restis, ne trovante iun por paroli. Tamen la blindulo demandis, ĉu mi konas la landon, kaj laŭ mia jesa respondo, petis, ke mi konduku lin al la trovhundejo.

La hundejo efektive ne estas malproksima, kaj mi malpravus, forgesante ĝin en l'aro da konstruaĵoj pli malpli naŭzigaj kaj malnoblaj, ordinara ornamo de niaj provincaj urboj.

Dum la irado, la blindulo rakontis al mi sian aventuron. Panserĉisto, antaŭhieraŭ, ankaŭ suferanta pro la varmo kaj elpuŝanta la langon, li havis ideon ekmalvarmigi sin en modesta drinkejo, kie oni vendas gajigan vineton, kiu havas guston de vinbero kaj ne kostas kare.

— « *Kiom ajn malriĉa oni estas, tamen oni povas soifi, kiam de l'mateno oni kura-*

dis de kampodomo al kampodomo tra pulvoro de grandaj vojoj. Bedaŭrinde li ekdormis kaj sentaŭguloj profitis lian dormadon por distranĉi la hundan ligilon kaj forkonduki la beston. Ĉar ili fortrenis ĝin, sinjoro, fortrenis perforte : propramove la bona besto ne lasus min por ilin sekvi. Tiel bona hundo, sinjoro, Mi nomis ĝin Buriketo (azeteto) pro amikeco, kaj ĉar iafaje en niaj disputoj, kiam ĝi metis en sian kapon min konduki, kien mi ne volas iri, ĝi estas tiel obstina, kiel homo ! »

Fine la voĵorgisto vidis tri vagulojn malbone vestitajn. kun mieno de antaŭurbaj friponuloj, kiuj, ridante kiel post kulpa faro, trenis la hundon al la urbo. Kaj ĉar restinte sola, nia blindulo senesperigis, veturigistoj konsentis lasi lokon al li sur sia veturilo.

Jus alveninte, li informiĝis iom ĉie. Iu diris, ke efektive hundo terurigita, senkolĉena, ŝajne blindula hundo, vagas tra la stratoj.

Li tiel serĉis Buriketon dutage, kaj ĉar Buriketo ne retroviĝis, iu konsilis iri al la trovhundejo.

— « *Mi sciis nenion, sinjoro ; oni diras, ke ĝi estas loko, kie oni enŝlosas senmastrajn hundojn. Oni mortigas ilin — ĉu vi komprenas tion ? — se ili ne estas repostulitaj en dudek kvar horoj. Se nur Buriketo ne tie estus de hieraŭ ! Sed Buriketo estas vigla, ĝi konas nur min ; la maliculo ne lasas sin kapti tiel rapide.* »

La blindulo marŝis ĉiam parolante, serĉante konsoli, trompi sin mem. Sed mi vidis bone, ke en fundo de l'animo li estas tre malkvieta pri sorto de Buriketo.

Ju pli proksimiĝis la celo, des pli lia parolado fariĝis kortuŝita, kaj li subite tute paliĝis, kiam, haltante, mi diris : « *Estas tie ĉi.* »

Tiu konstruaĵo estis malgajega kaj ĝia aspekto, se li povus ĝin vidi, estus elfininta senesperigi la malfeliĉan homon ; malgranda korteto antaŭ ronda turo, kiu kredeble estis

iam parto de la fortikaĵoj. Sur la pordo, subskribo per nigraj literoj : « trovhundeco ». La hundoj, enirante, devis, kiel oni diras, « senti la morton » ĉar la hundeco kuntuŝis senfeligojn.

Ni sonoris. Oficisto kun galona kasketo malfermis. Li rekonis min kaj subite afabliĝis. — « Blindula hundo, tondita leono, kun tufo ĉe la vosto ? Ne, mi ne memoras pri tia hundo... Sed oni povas ĉiam vidi, vi komprenas : tiel multaj alvenas ! La ordonoj estas tre severaj de kelka tempo pro la rabio. »

Ridante, li gvidis nin al angulo de la korto, kie en kadra hundeco, kelkaj malfeliĉaj hundetoj ankoraŭ ne postulitaj, atendis sian sorton.

Neniu bojis ĉe nia proksimiĝo. Malribe-lante, melankolie, ili rigardis nin per dolĉaj okuloj. La blindulo alvokis Buriketon, sed Buriketo ne respondis.

— « Jen, diris la oficisto, ĉiuj hundoj kaptitaj hieraŭ. »

— « Kaj, la aliaj, tiuj de antaŭhieraŭ ? »

— « Ho ! tiuj ĉi ! Ilia kalkulo estas fermita ! De tiu mateno ili jam ne bezonas nutraĵon. »

Tiam ne povante kaŝi siajn antaŭsentojn malĝojajn, la blindulo, kun voĉo igata ankoraŭ pli petega de la kortuŝeco, demandis : « ĉu oni permesus al mi ilin vidi ? Por esti tute certa... ĉu okaze... ».

— « Nenio pli facila ; ili estas tie ; pro najbara knabo kiu malfruiĝis kaj ankoraŭ ne kunprenis la liveraĵon. »

Ĉirkaŭ ronda kaj volba ĉambrego, duona dekduo da hundoj pendis de hokoj fiksitaj en la muro ; la kolo estis premata de laĉo, la korpo streĉita, la lango eltirita ; ili prezentis la sintenadojn malĝoje komediajn, kiujn pendilo donas, ŝajne, al bestoj, kiel al homoj.

Sunradio penetris tra celtruo, blindiga kaj maldika, kiel fajre ruĝigita ferstango ; kaj tiu radio, ŝprucigante per oro la ruĝan kaj malpuran pavimentaron, pligras la funebran mallogecon de tia vidiĝo.

Naŭzigite, mi provis forigi la blindulon : « Eliru ! Via Buriketo ne estas tie ĉi. »

Sed la blindulo rifuzis, malkonfidante ; li havis sian ideon kaj volis sciigi per si mem. Malrapide, per siaj tremantaj manoj, li palpis, unu post alia, la mortintojn, kaj li haltetis iafaje, timante rekoni Buriketon. Je la tria — pudelo kun griza ŝaflano — li kortuŝiĝis kaj rekomencis, tre ekscitite, sian mutan serĉadon. Nova esploro pli atenta trankviligis lin. Li diris al ni : « Mi tre timis : tiu ĉi similas al ĝi sed ne estas ĝi ».

Fine, kiam li estis ĉe la lasta, kun feliĉa ekĝemo : « Vi estas bonaj homoj, mi dankas vin. Vidu ! Pensi, ke Buriketo povis tiamaniere morti ! Mi ne estus dorminta la tutan nokton. Sed nun, se venus frizpudelo, kaj se ĝi estas Buriketo, oni ne mortigos ĝin, ĉar antaŭe mi repostulis ĝin. »

La oficisto promesis kaj aldonis : « Tio ĉi estas via rajto, se vi volas veni tien ĉi ĉiumatene. Kaj nu ! Mi konsilas al vi, atendu. La suno mallevigas kaj la transportilo ne malfruos alveni kun la ĉasaĵo de la tago. »

Li estis prava : la veturilo alvenis, antaŭirata de bruoj de dika sonorilo, kiu post la kradoj, ĉe sojlo de la pordoj, pretervekis koncerton de furiozaj bojoj. Du homoj, armitaj per laĉo, kaj ŝnuroj, akompanis ĝin.

Tuj antaŭ la hundeco oni mallevis la balancoklapon, kiu similigis la veturilon al grandega muskaptejo. Sed la kaptitoj, devenante, ne volis eliri.

— « Buriketo ! ĉu ci estas tie ? » diris dolĉe la blindulo.

Hundo elsaltis, bojanta, freneza je ĝojo.

« Ha ! Buriketo ! Ha ! La malspritulo, kiu lasis sin kapti ! »

Buriketo proponis jam sian kolon al la kolĉeno, lekante la manojn, kiuj alligis ĝin. Kaj dum mi senbrue pagis la elspezojn de la administracio, mi aŭdis la blindulon krian : « Iru, Buriketo, iru antaŭen, ĉiam rekte, kamparen ! Iru Buriketo ! For de tiuj urboj kie homoj pendigas hundojn ! ».

PAUL ARENE (trad. P. Sarpy).

POR VIA DISTRO

Nia Konkurso

Unua problemo — Nombra enigmo (20 poentoj)

Ĉiu nombro signifas unu literon. La solvo konsistas el 79 literoj. La ŝlosil-vortoj estas :

28-27-19-8-7-9-74-5-4-3-2-56 : nomo de eminenta esperantisto

33-10-22-14-11-57-48-49 : bela birdeto

24-15-74-18-26-36-50-51 : orientazia lando

1-71-12-13-47-41-5-20-35-34 : ruslanda urbego

55-10-63-23-16-17-18-31-32-25 : balkana lando

73-6-29-30-38-37 : parto de la vorto

53-33-36-76-75-78-57-59 : brazila mono

60-42-76-40-39-45-43-53-77 : granda lacerto

54-52-68-70-64-65-8 : amerika frukto

21-58-61-62-11 : granda blanka floro

3-46-79-67-66-23 : bonodora spicaĵo

44-25-69-2-72-15 : fidela al sia superrulo

1-79 : tre interesa araba proverbo, kiu laŭdire baziĝas sur nekalkuleble multaj spertoj.

Dua problemo. — En ĉiu suba frazo estas lingva eraro. Bonvolu korekti ilin. Ĉiu ĝusta korektado ricevos 2 poentojn sed estos forprenita po unu poento por ĉiu malĝusta korekto.

1 — Vi nur ĉirkaŭbrakas min, kiam vi bezonas monon !

2 — Bonvolu nin sendi informoj por nia bul-teno.

3 — Ĉiuj tiuj radioj estas transporto da energio.

4 — Mi desaltis de el la glitveturilo.

5 — Via letero min tre ĝojis.

Sendu viajn respondojn antaŭ la fino de Marto al :

S-ro P. Chevalier, 19 boulevard Gabriel-Lauriol
44 — Nantes, Francujo.

AMUZAJ PROBLEMOJ (APARTAJ DE LA KONKURSO)

Solvo de la antaŭaj problemoj :

En Bolonujo : Estas dudek tri literoj en la Bolona alfabeto. Se oni uzas nur tri literojn por registri la aŭtomobilojn oni povos registri nur : $23 \times 22 \times 21 + 6 = 1.771$ aŭtomobilojn.

Uzante kvar literojn oni povos registri : $23 \times$

$22 \times 21 \times 20 + 24 = 8.855$ aŭtomobilojn.

La kvadrato : La sumo de la nombroj de ĉiu diagonalo estas 34. Oni ne tuŝu ilin. Permutu la unuan kaj la kvaran liniojn kaj poste la duan kaj la trian. (fig. 1). Fine permutu la nombrojn de la unua kaj de la kvara, de la dua kaj de la tria kolumnoj, ĉiam ne tuŝante la nombrojn de la diagonaloj. (fig. 2).

fig. 1

1	14	15	4
9	6	7	12
5	10	11	8
13	2	3	16

fig. 2

1	15	14	4
12	6	7	9
8	10	11	5
13	3	2	16

Novaj problemoj :

La cirklo kiu havas du centrojn : Estu angulo AIB, la punktoj M sur IA, N sur IB, la perpendiklo MC sur IA kaj, la perpendiklo NC sur IB. La cirklo kiu pasas per M,C,N pasas ankaŭ per D sur

IA kaj E sur IB. Montru ke tiu cirklo havas du centrojn.


La pilkoj : Oni aĉetis 15 tenisopilkojn por iu sumo. Se ĉiu pilko kostus 20 centimojn malpli ; oni povus aĉeti 5 pliajn pilkojn. Kiu estas la prezo de ĉiu pilko ?

GRAMATIKO PER BONHUMORO

« Se la adverbo devenas de verbo transira (kiu postulas akuzativon), tiam ankaŭ la adverbo-prepozicio konservas tiun saman econ kaj estas uzata kun la akuzativo ; se la adverbo anstataŭas vorton, kiu povas ligiĝi kun substantivo nur per ia prepozicio, tiam ankaŭ la adverbo akceptas post si tiun prepozicion ; se la adverbo estas vorto ne devena, sed originala, kiu per si mem havas la sencon de prepozicio, tiam ĝi ligiĝas kun la substantivo senpere.

Tamen en ĉiu duba okazo vi ne faros eraron, se vi post adverbo-prepozicio uzos la prepozicion « je » aŭ la akuzativon.

(L.L. Zamenhof. Lingvaj respondoj).



— Kaŭze de tiu televido, la rostbovaĵo estos tro kuirita.




— Spite kelkaj malfacilaĵoj mi sukcesis ĝin fari !



— Rilate vian am-deklaron, ĉu vi estas certa pri viaj sentoj, Joĉjo ?

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (39 aŭst. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (70 fr.).
Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (10 ŝil.).
Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (1,50 us. dol.).
Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (10 kr.).
Finnlando : S-ino Kerttu Väättänen, Mäntyläntie 4, LAPPEENRANTA 5 (6,2 mk.).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33, - pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (5,6 mk.).
Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1º, la, BARCELONO (77 pes.).
Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (840 lir.).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝfako 239 (1260 d.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (5 guld.).
Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg. 56, LAMBERTSEDER (10 kr.).
Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (50 zł.).
Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk. 157007 (8,4 kr.).
Svislando : S-ino H. Chavan, rue-Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).
Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).
Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (1,50 dol.).
Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncintajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plilerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo